
**Vicente Manzano-Arrondo pri**

**"Mi pequeña gramática de Esperanto", verkita de Petere Weide**




Nur 30 paĝojn! Mirinde! Weide atingas aranĝi en eta spaco egan enhavon. Kompreneble, oni ne rajtas esperi, ke tia gramatika manlibreto havu sufiĉan amason da ekzemploj kaj ĉiutagaj situacioj por plene posedi la lingvon. Tion eĉ ne atingas la fama PMEGo, kiu estas konata de preskaŭ ĉiuj, kelkfoje malfermita de multaj, parte studata de pluraj, kaj tralegita de preskaŭ neniu.

La Weidea libreto temas pri aranĝita promeno sur la lingva Esperanta vojo tra ĝiaj eroj: kiuj ili estas (substantivo, verbo ktp), kiel ili miksiĝas por atingi frazojn (afiksoj, akuzativo ktp), kio okazas pri kelkaj flankoj el la lingvo (tabelvortoj, komparadoj ktp), kaj kiel scii pli (datoj, utilaj retpaĝoj). Ĉiumomente, la aŭtoro klopodas sekvi la saman logikon por ĉiu lingva elemento: nomo, rolo, klarigoj, ekzemploj.

Vi havas en tiu paĝaro bonan ilon por apogi la lernadon de viaj komencantoj pere de rimedo, kiu povas roli kiel manlibreto por esti konsultita laŭbezone. Ne esperu luksan eldonon sed utilan. Kohere, ne esperu multekostan decidon. La kajero kostas 3,50 € plus sendokostoj, ĝi estas mendebla ĉe peter.weide@mail.dk. Tamen vi povas mendi mil ekzemplerojn por via sukcesa kurso kaj atingi bonan rabaton.

Pliajn informojn vi trovos sur la retpaĝo http://esperanto-gramatiko.saluton.dk/esperanto-gramatiko-superrigardo/espanol .

Prezento ĉe edukado.net: https://edukado.net/biblioteko/libroj?iid=23479

.